

Zoom-kunveno 20a de februaro 2020, 21.00 UTC.

Partoprenis: Ivan Colling, Renato Corsetti, Katalin Kovats, Vicente Manzano Arrondo, Radojica Petroviĉ, Fernando Pita, Angela Tellier.

La kunveno celis la konkretigon de niaj diskutoj dum la pasinta jaro, la ellaboron de praktikaj paŝoj por antaŭenigi niajn celojn. Ni decidis dividiĝi en subgrupojn por prilabori temo(j)n/projekto(j)n gvidatajn de membroj de la grupo, kaj kun la subteno de la tuta grupo. Ĉiu subgrupo rajtas aligi eksterajn membrojn al sia grupo laŭnecese.

Projektoj proponataj (gvidos)

1. Unu-paĝaj resumo(j) de artikolo(j) (Angela)

La celo estas montri al la ekstera mondo ke Esperanto kaj interlingvistiko estas esplorindaj/endaĵoj temoj, kun la pli longdaŭra celo ke esperantaj revuoj estu referencataj en la scienca mondo (ekz per SSCI ktp).

Praktike: Angela petos aŭtorojn verki unu-paĝan resumon de unu aŭ pluraj el siaj artikoloj pri Esperanto, interlingvistiko, aŭ alia planlingvo. Artikoloj resumotaj devus jam esti aperigitaj en revuo kolege reviziita ('peer-reviewed journal'). Angela verkos mallongajn gvidliniojn, kaj preparos ŝablonan resumon. Oni rajtas prepari resumon de artikolo verkita de alia, sed por tio oni devas havi la permeson de la aŭtoro.

Helpo bezonata: Angela helpas en la kontrolado de la angla, se oni deziras, kaj aliaj grupanoj pretas helpi en la kontrolado de aliaj lingvoj.

Subgrupoj: Angela, Radojica, Renato

2. Universitataj paĝoj: Edukado.net (Katalin)

Katalin informos nin pri vivigo de la universitata formularo en Edukado.net. Grupoj estas petataj plenskribi la formularon por testi ĝin. Poste ni estas petataj disvastigi informojn pri ĝi. Katalin montris kolekton da paĝoj kiujn ŝi komencis prepari (<https://edukado.net/kursejo/universitatoj>)

Helpo bezonata: "Mi povas evoluigi la paĝon, kaj ties subpaĝojn, sed nepre bezonas helpon, ne nur kolektadon de la informoj, sed ankaŭ redaktoran."

Subgrupoj: Katalin

3. Manlibreto pri esplorado de la homa konduto (Viko)

Prov-versio, kiu bezonas provlegadon kaj poluradon. Unua paŝo estus trovi homojn, kiuj trovas la libron interesa kaj pretas ĝin prikomenti.

Helpo bezonata: Dissendo de la libro al nia Universitata-listo, kun klarigo; peto provlegi.

Subgrupoj: Viko. Renato (uni-listo) kaj Angela (pepos pri ĝi @ESFACademic)

4. Esploro pri Universitat-nivela instrulibro (Renato)

RC legos la librojn de Wim Jansen kaj Vera Barandovska-Frank (*Interlingvistiko - Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*) – komparos, kaj raportos al ni.

Helpo bezonata: momente ne

Subgrupoj: Renato, Fernando

5. Plimultigo de la kursoj pri Esperanto aŭ Interlingvistiko (Renato)

ILEI ne havas liston de siaj membroj, fakto kiu malhelpas al ni kontakti la instruistojn.

Helpo bezonata: unua paŝo estas kuraĝigi ILEI krei uzeblan liston. Due, konsideri ke plimultigo de la kursoj estas esenca por ILEI, kiu okupiĝas pri instruado de Esperanto en ĉiurangaj lernejoj. Renato dissendos novan alvokon pri tio kun la filmeto de Katalin.

Subgrupoj: Renato. Ivan kaj Radojica (listo de ILEI). Katalin (filmoj)

6. Studentaj kluboj en universitatoj (Karina)

Karina proponis manlibron por junuloj kiuj volas krei esperantajn klubojn en siaj universitatoj. Kaj sekve montri la klubojn en la sociaj retejoj de TEJO (TEJO havas liston de aktivaj universitataj grupoj - kontaktos por fari fotojn kaj/aŭ videojn). Renato sendos al Karina la adresojn, kiujn li havas.

Helpo bezonata:

Subgrupanoj: Karina, Renato

7. La revuo 'Simpozio'

Fernando raportas ke la tuta kolekto de la filozofia revuo 'Simpozio' estas perdita el sia universitata rethejmo, kaj li petas nian helpon trovi kie kuŝas aliaj ekzempleroj por povi rekrei la kolekton.

Helpo bezonata: elsarki la revuon 'Simpozio'

Subgrupanoj: Fernando, ni ĉiuj esploru

(8) Afriko

Viko petas nian helpon eltrovi kontaktojn en Afriko kiuj konas homojn kiuj laboras en universitato, aŭ kiuj estas studento aŭ profesoro/lektoro en afrika universitato.

Helpo bezonata: serĉi kontaktojn

Subgrupanoj: Viko, ĉiuj ni

(9) Open Journal Systems

Viko havas entuziasman studenton; kune ili faris provon per ĉi tiu sistemo, kiu bone sukcesis. Necesas trovi spacon en retejo kie ĝi povus funkcii. Kaj revuojn por publikigi. Poste, ni povus pripensi ĉu la sistemo taŭgas por la resumoj - vidu (1)

Helpo bezonata: pripensi alireblan retspacon; pripensi kion eldoni (Angela: ĉu komence ni povus provi per serio da ekzemplaj paĝoj el IPR?)

Subgrupanoj: Viko, ĉiuj ni

(10) Venonta kun-Zumado

Angela preparos dudlon por marto.